I. F. E. A.
ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 2 - 3 Februaro kaj Marto 1957 7° Jaro

## AVVISO DEL CASSIERE

Ancora molti, troppi, dei nostri Soci non hanno versato le quote per il 1957.
Le Associazioni di cui siamo aderenti: Internacia Federacio Esperantista Fervojista (I.F.E.F.) in Amsterdam, Universala Esperanto Asocio (U.E.A.) in Rotterdam, Federazione Esperantista Italiana (F.E.I.) in Torino, hanno preteso gli elenchi dei Soci ed i relativi importi e pure noi, per poter continuare a spedire il Bollettino abbiamo bisogno dei "fondi" per l'acquisto del materiale necessario.
Non avendo ricevuto avviso di dimissioni da nessuno abbiamo rinnovato e di conseguenza pagato alle suddette Associazioni le quote per tutti i Soci dell'anno scorso, per cui preghiamo caldamente tutti a servirsi dell'unito Bollettino per il versamento della quota nel Conto Corrente Postale N°8/24094.

## 9-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

RIJEKA (Jugoslavio) 11 - 17 Majo 1957

Adreso: Rijeka, poŝtfako 95 - Bankkonto: 508-T-969, Narodna banka Rijeka

## 2-a OFICIALA BULTENO

### OFICIALA PROGRAMO

| | | |
|---|---|---|
| Sabato, 11 Majo | 8 h. | Malfermo de la kongresejo |
| | 15 h. | Kunveno de I.F.E.F. estraro kaj de la L.K.K. |
| | 15,30 | Delegitara kunveno |
| | 20 h. | Interkonatiĝa vespero |
| Dimanĉo 12 Majo | 9 h. | Komuna fotografiĝo |
| | 10 h. | Solena malfermo de la Kongreso |
| | 16 h. | Kunveno de la terminara komitato |
| | 20 h. | Folklora vespero |
| Lundo, 13 Majo | 9 h. | Unua laborkunveno. |
| | 9,30 | Vizitoj al fabrikoj, muzeoj kaj aliaj vidindaĵoj |
| | 15 h. | Prelego pri Jugoslavio |
| | 16 h. | Filmprezentado |
| | 20 h. | Teatra Vespero |
| Mardo; 14 Majo | 9 h. | Dua Laborkunveno |
| | 9,30 | Vizitoj al fabrikoj, muzeoj kaj aliaj vidindaĵoj |
| | 11 h. | Oficiala akcepto ĉe urbestro |
| | | Posttagmezo kaj la vespero liberaj |
| Merkredo 15 Majo | 8 h. | Tuttaga ekskurso al insulo Rab per motorŝipo; sur la ŝipo danco dumvoje. Sur la insulo akcepto ĉe urbestro, tagmanĝo en libera naturo kie estos aranĝita popola festo. Vespere Komuna vespermanĝo. |

| | | | |
|---|---|---|---|
| Ĵaŭdo, 16 Majo | 9 h. | - | Tria laborkunveno |
| | 9,30 | - | Vizitoj al fabrikoj, muzeoj kaj aliaj vidindaĵoj |
| | 15 h. | - | Fakprelego |
| | 17 h. | - | Filmprezentado |
| | 20 h. | - | Internacia balo |
| Vendredo, 17 Majo | 9 h. | - | Ekskurso al fama groto de Postojna per speciala vagonaro. Trarigardo de la groto, poste tagmanĝo |
| | 20 h. | - | Solena fermo de la Kongreso |
| | 20,30 | - | Folklora vespero. Post folklora vespero danco ĝis mateno. |

11 KAJ 12 Majo Tagnokte funkcios akceptejo en stacidomo

## OFICIALAJ SCIIGOJ

Korespondado: La Oficiala lingvo de la kongreso estas Esperanto; korespondante kun la L.K.K. nepre citu numeron de via kongreskarto.

Poŝtadreso: 9-a Internacia Fervojista Esperanto Kongreso Rijeka, poŝtfako 95.

Banko: Narodna Banka Rijeka, Bankkonto 508-T-969.

Kotizoj: Kongresano din. 1100 (4-$ ) Familiano de la kongresano din.700 (2,50-$) Pensiulo din. 550 (2-$). Pago al nia supra bankkonto.

Glumarko: Kontraŭ du respondkuponoj ni sendas 5 slipojn (40 glumarkojn)

Devizoj: En Jugoslavion ĉiu persono povas enporti nelimigitan sumon da devizoj, se ĉe la limo oni devas anonci al doganistoj la sumon, por kiu oni ricevas kvitancon; ĉe revojaĝo oni povas senĝene reporti la neelspezitajn devizojn. Do gardu la kvitancon. Dinaran valuton oni povas en kaj elporti en sumo de din.3000 en ne pli grandaj monbiletoj ol 100 din.

Vizoj: Jugoslavaj vizoj estas facile haveblaj pere de Jugoslavaj konsulejoj. Por plirapide ricevi la vizon montru vian kongresan karton.

Afiŝo: L.K.K. eldonos afiŝon. Ĝi estas sendota nur al Esperantaj organizoj.

Fervojrabato: Laŭ la konvencio aktivaj fervojistoj ĝuas senpagan vojaĝon kaj la familianoj 50 % rabaton. Nia lando havas konvencion kun ĉiuj landoj krom U.S.A. kaj S.S.S.R. Por ricevi pli detalajn informojn turnu vin al la kompetentaj fervojistaj instancoj en via lando. Ni atentigas vin ke la havigo de vojaĝbiletoj daŭras 3-4 semajnojn.

La Kongresejo: Kongresejo estas Domo de Sindikatoj por distrikto Rijeka. Vesperaj aranĝoj okazos en nubskrapanto Suŝak.

Monŝanĝejo: Monŝanĝejo funkcios en la kongresejo.

Poŝto: Poŝto funkcios en la kongresejo. Ĝi uzos specialan poŝtstampon.

Informa servo: Informa servo funkcios en la kongresejo kie la kongresanoj povas ricevi ĉiujn informojn rilate fervojoj, ŝipoj, aŭtobusoj k.t.p.

Gazetara servo: Dum la tuta kongreso funkcios gazetara servo. Reprezentantoj de gazetoj povas ricevi materialon montrante rajtigilon de sia gazeto. Same la materialon estos sendota al redakcioj kiuj ĝin ĝustatempe petos de la L.K.K.
Ni petas sendi al ni gazetojn naciajn kaj esperantajn, kiuj skibos pri la kongreso. Anticipan dankon!

Loĝado: En Rijeka estas sufiĉe da hoteloj sed bedaŭrinde kun tre malmultaj unulitaj ĉambroj. Tial ni petas mendi la ĉambrojn kune kun viaj amikoj.

Prezoj: Pensiono en unulita ĉambro 1250-1600 din. Pensiono en 2-3 lita ĉambro 1000-1350 din. Pensiono en amasloĝejo 600-650 din. Pensiono en bonaj tendoj 500-550 din. Nur tranokto en unulita ĉambro 600-700 din. Nur tranokto en 2-3 litaj ĉambroj 400-500 din. Nur tranokto en amasloĝejo 200 din. Ni disponas kun sufiĉaj litoj en privataj domoj prezoj 300-400 din.
La prezoj por tranokto ne enkluzivas la matenmanĝon. La plej malproksima hotelo estas 7 minutoj per la buso ĝis centro kie estas la kongresejo. Ni atentigas vin ke estas pli konvene preni la pensionon ĉar pagante aparte loĝejon aparte manĝon la kostoj plialtiĝas.

Manĝoj: En rijekaj hoteloj kaj restoracioj manĝoj estas ĝenerale bonaj kaj abundaj. Prezoj estas jenaj: Matenmanĝo 100-150 din. Tagmanĝo 350-400 din. Vespermanĝo 350-400 din. En la urbo ekzistas malplikostaj restoracioj kaj lakto-restoracioj, kie oni povas manĝi.

Limdatoj: Limdato por mendo de ĉambro kaj manĝo estas 20/4/1957. Limdato por aliĝo estas 30/4/1957. Ni povas garantii la ĉambron nur al tiuj, kiuj ĝin mendos kaj pagos ĝis tiu dato.

Ŝoiigo: Kongresanoj el nordaj partoj de Eŭropo uzu "Jugoslavia Expres". Ĝi provizore ne trafikas pro manko da karbo en Aŭstrujo. Ĝi ektrafikos en aprilo, kongresanoj el sudaj partoj uzu "Orient Expres".

Ekskursoj: EKSKURSO AL INSULO RAB PER MOTORŜIPO la 15/5/1957 - ekveturo el Rijeka je la 8-a horo, alveno al Rab 11,30 h., forveturo el Rab je 20 h., alveno al Rijeka je 23,30 h. Dumvoje sur la ŝipo danco. Sur la insulo akcepto flanke de urbestraro kaj la popolo. Oficiala akcepto ĉe urbestro. Tagmanĝo en libera naturo, kie estos servataj popolaj specialaĵoj kaj aliaj manĝoj laŭdezire. Vespere komuna vespermanĝo por ĉiuj kongresanoj. Insulanoj laŭeble aranĝos folkloran programon. Prezoj: Ŝipveturo tien kaj reen 850 din. Tag- kaj vespermanĝo kune 900 din. En la prezo por la manĝo estas enkalkulita ankaŭ duona litro da speciala raba vino.

EKSKURSO AL FAMA GROTO DE POSTOJNA la 17/5/1957 - Natura miraklo, kiun devas nepre ĉiu vidi. En apudgrota restoracio estos preparita tagmanĝo. Trarigardo de lagroto ĉ. 2 horojn. Atentu ke konstanta temperaturo en la groto estas plus 8 gradojn, tial kunportu jakojn aŭ mantelojn. La vagonaro estas senpaga. Kongresanoj pagas enirprezon de din.260, tagmanĝo din.480. Enirprezo inkluzivas ankaŭ la bileton por la grota vagonaro.

ALIAJ EKSKURSOJ - La turista entrepreno aranĝos por la kongresanoj dum la kongresaj tagoj mallongajn kelkhorajn ekskursojn en apudmarajn kaj montarajn lokojn per modernaj aŭtobusoj. Aliĝoj en kongresoficejo.

## 42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MARSEILLE - 3 - 10 Aŭgusto 1957 - FRANCUJO

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille, Francujo. Telegrafo: Esperanto. Banko: James Rosa. Ĝirkonto: Groupe Esperantiste - Marseille n-ro 156-15.

N-ro 4 kaj 5 — OFICIALA KOMUNIKO — Januaro kaj Februaro 1957

Pagoj: Bonvolu atenti, ke la sola adreso por la poŝtmandatoj estas: Groupe Esperantiste - Marseille n-ro 156-15. Ĉiu erarita adresigo povas kaŭzi malfacilaĵojn kaj eĉ perdon de la pago.

Afiŝo: Granda afiŝo pri Marseille, cm.60 x 100 kun arta bildo de la kongresurbo kaj teksto en Esperanto estas dispinebla en limigita kvanto. Prezo: 300 fr.fr. aŭ 8 respondkuponoj por ĉiu ekzemplero. Mendanto ĝin oni devas mencii la lokon en kiu ĝi estos publike ekspoziciata.

Novaj perantoj: Reĝa Belga Esperantista Ligo, s-ino J.Plyson, 185, rue Jordan, Bruxelles, Flandra Ligo Esperantista, f-ino J.Terrijn, 74, Raapstraat, Gent; Svisa Esperantista Societo, s-ino Daisy Perrenoud, Faubourg de la Gare 13, Neuch.

Nova Karavano: Centra Dana Esperantista Ligo agnoskis ŝenan karavanon: S-ro S.K. Nielsen, Havepladsvej 129, Fredericia.

Blindula kongreso: La 27-a Internacia Kongreso de la Blindaj Esperantistoj okazos en la kadro de la antaŭ-kongresaj manifestacioj en Lyon de la 30-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1957.

Fakkunvenoj: Anoncis kunsidojn: Akademio de Esperanto, Wassenaarseweg 11c, Den Haag, Nderlando. Kristana Esperantista Ligo Internacia, Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Kwaadmechelen, Belgujo. Universala Ligo, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

Akcepto: Radio-Fakuloj kaj esperantistaj oratoraj ĉe Radio-stacioj estos akceptataj en vizitoĉe la Radiaj kaj Telavidaj instalaĵoj de Marseille.
Kongresejo: La Universitato de Marseille, Scienca Fakultato, estos la Kongresejo de la 42-a Universala Kongreso de Esperanto.
Inaŭguro: La Solena Inaŭguro okazos en la klasik-stila Operdomo de Marseille, rimarkinda arkitektura verko de la XVIII jarcento.
Loterio: Al la loterio inter unuaj mil kotizintaj kongresanoj estu aldonitaj kiel novaj premioj kvin abonoj al la gazeto"La Progreso". La premioj nun atingas entute la nombron de 41.
Nova kunveno: Loka Loĝio de la Rito "Droit Humain" invitas la framasonajn esperantistojn, apartenantajn al kiu ajn Rito, al kunveno dum la Universala Kongreso. Vin turnu al: Hypatie (Esperanto), 24 rue Armand Bèdarride, Marseille, Francujo.
Akcepto: La Urbo de Marseille, kunlabore kun aliaj gravaj Institucioj en Marseille, akceptos regale la kongresanojn.
Gazetara Servo: La Kongresa Gazetara Servo, la plej ampleksa el ĝisnunaj, komencis sian informadan aktivecon.
Postkongresa ekskurso: La postkongresa ekskurso vizitos Korsikon, patrujo de Napoleono. La veturado okazos per aviadilo AIR FRANCE.
Kongreso kaso: L.K.K. plu ne akceptas donacojn por la Kongreso Kaso. Donacintoj kaj donacontoj povas elekti inter la Literatura Kaso, Blindula Kaso kaj Adopta Kaso.
Infana Kongreseto: La Dua Internacia Infan-kongreseto, en la kadro de la Universalaj Kongresoj, akceptos duntage infanojn naskiĝintajn inter la 1-2-1951 kaj la 31/12/1943. Laŭ skriba atesto de la gepatroj, la infanoj parolu Esperanton sufiĉe por interkompreniĝi. La provizora programo antaŭvidas ekskursojn al taroj kaj maraj lokoj de la sunplena Provenco, ludojn, filmprojekciojn, k.t.p. Aliĝkosto por la tuta semajno, inkluzivo manĝojn, 3.000.= fr. Por informoj vin turnu al s-ro F.Cadanel, 32 rue George, Marseille, Francujo.
Teatraĵo: Teatra trupo de Marseille kun artistoj el Parizo ludos en Esperanto la teatraĵon "Topaze" de Marcel Pagnol, membro de la "Académie Francaise".
Statistiko: (ĝis fino de januaro) Alĝerio 1, Aŭstrujo 13, Belgujo 9, Brazilo 3, Britujo 50, Bulgarujo 5, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 18, Finnlando 10, Francujo 222, Germanujo 62, Hispanujo 18, Italujo 94, Jugoslavio 27, Japanujo 2, Maroko 4, Meksikio 2, Monaklando 3, Nederlando 28, Norvegujo 5, Novzelando 2, Pollando 3, Portugalujo 5, Saarlando 1, Svisujo 16, Svedujo 37, Usono 3, Entute 645 el 27 landoj (Pasintjare 1080 el 31 landoj).
Suplemento al la Oficiala Komuniko n-ro 5, februaro 1957
POSTKONGRESA EKSKURSO AL KORSIKO (10-23 aŭgusto 1957)

La postkongresa ekskurso al la insulo de belecoj, Korsiko, lando de Napoleono, intencas doni al la kongresanoj la eblecon ĝui en kondiĉoj de granda komforto la naturajn ĉarmojn de tiu Mediteraneo, kiu estas simbolo en la tuta mondo de senkompara poezio.

La vojaĝo okazos per unuaklasa aviadilo AIR FRANCE kaj la ekskursantoj loĝos en unuaranga Hotelo, meze de trankvila parko, en Ajaccio. La programo lasas sufiĉe da libera tempo al la ekskursantoj, por ke ili laŭelekte partoprenu en la diversaj distroj de la banlokoj; ĉefe la vesperoj povas esti gajigataj de multnombraj spektakloj en la CASINO kaj en la tipa korsikaj kafejoj, kie kunvenas la plejparto de la gitaristoj. Duntage la belaj plaĝoj de Ajaccio proponas sin al plaĉa ripozo post la kongresaj laboroj. Speciala akompananto de la Kongreso sin okupos pri la deziroj de la vojaĝantoj.

Sabaton, 10 aŭgustu-Foriro de Marseille dummatene per turisma aviadilo. Alveno en Ajaccio, enloĝigo en la Hotelo kaj tagmanĝo. Posttagmeze: vizito al la urbo kun akompanado de loka gvidisto: Domo de Napoleono, Muzeo de Napoleono, Imperiestra Kapelo, Muzeo Flesch (kolekto de Korsikaĵoj) k.t.p. Promenado ĝis la POINTE DELA

PARATA, de kie oni belege alrigardas al la ILES SANGUINAIRES (sangavidaj insuloj) Reveno al la Hotelo. Vespermanĝo. Libera Vespero.

Dimanĉon, 11 aŭgusto - Foriro matene. Veturado per aŭtobuso laŭlonge de la ROUTE DU LITTORAL al CARGESE, fondita de greka kolonio. Rigardado de la greka kaj latina preĝejoj. Alveno al PIANA, kun ĝiaj mirindaj "Calanches", idiliaj fjordetoj rokaj kaj kuriozformaj, ornamitaj de afrikaj kreskajoj, penetrantaj en la maron en la grandioza dekoracio de la Golfo de PORTO, plonĝita en tre bela lumeco. Tagmanĝo en Piana aŭ Porto. Reveno al Ajaccio vespere. Vespermanĝo. Libera Vespero.

Lundon, 12 aŭgusto - Matenmanĝo. Libera mateno. Tagmanĝo kaj foriro al "CIRCUIT DU MAQUIS", montregiono, kie rifuĝis la banditoj, kiuj mortigis pro kaŭzo de honoro. Reveno al Ajaccio vespere. Vespermanĝo. Libera vespero.

Mardon, 13 aŭgusto - Matenmanĝo. Libera mateno. Tagmanĝo. Alveno al la flughaveno CAMPO DELL'ORO en Ajaccio kaj foriro al Marseille, kie oni alvenas en la vespero.

Prezo: inkluzive vojaĝon per aviadilo, restadon en Korsiko kun kompleta pensiono, vizitojn kaj ekskursojn, akompanadon kaj impostojn 31000,- fr.fr.

Konstanta Kongresa Sekretario: Gian Carlo Fighiera

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 - ROMA (Italia)

---

DISSENDOJ EN ESPERANTO - JARO 1957-a

La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.) Ondlongoj:metroj 30,90 = Mc/s. 9,71 - metroj 41,24 = Mc/s. 7,27 - metroj 50,34 = Mc/s.5,96

Prelegantoj: mardes alterne S-ro L.MINNAJA kaj Prof. D-ro V. Musella
merkrede: S-ro Luigi MINNAJA - vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA

A P R I L O   1 9 5 7 - a

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 733 | mardon | la | 2-an | - Festivalo de la itala kanzono |
| 734 | merkredon | la | 3-an | - Kuriero de Esperanto |
| 735 | vendredon | la | 5-an | - Aprilo |
| 736 | mardon | la | 9-an | - Jozefo Garibaldi, okaze de la 150-a naskiĝa datreveno |
| 737 | merkredon | la | 10-an | - Kuriero de Esperanto |
| 738 | vendredon | la | 12-an | - Leterkesto kaj bibliografio |
| 739 | mardon | la | 16-an | - Novajoj el Italujo |
| 740 | merkredon | la | 17-an | - Kuriero de Esperanto |
| 741 | vendredon | la | 19-an | - Pasko |
| 742 | mardon | la | 23-an | - Naskiĝo de Romo |
| 743 | merkredon | la | 24-an | - Kuriero de Esperanto |
| 744 | vendredon | la | 26-an | - Torquato Tasso |
| 745 | mardon | la | 30-an | - Assisi, la urbo de Sankta Francisko |

La Fakestro: L. MINNAJA

F I A N Ĉ I G O

F-ino MARIEKE DE BRUIN, Esperantistino el Utrecht, van Hoornekade 89 bis (Nederlando) kaj S-ro JANKO BOŽIĈ - Militärakademiker - el Eberndorf Kärnten, Gablern 18, (Aŭstrujo), fianĉiĝis en Utrecht la 19-a de Februaro 1957.
Ni estas feliĉaj pri tiu fianĉiĝo ĉar la du gefianĉoj interkonis sin danke al Esperanto.
Ni sendas la plejkorajn bondezirojn de la Itala Esperantistaro.

K O R E S P O N D P E T O J

Staciestro en NovZelando, kiu ĵus aliĝis al I.F.E.F., deziras korespondadi kun kolegoj, okupantaj samajn oficojn. Skribu de multnombre al jena adreso: S-ro JAMES YOUNG, 18 Caius Avenue, Gonville, WANGANUI, Nov-Zelando.

En Hungario la prezidanto de la tramista esperantistaro deziras korespondadi kun kolegoj Amsterdamaj konstante. Skribu al jena adreso: S-ro RUDOLF HRACH, Pesterzsébet. Scéchényi u.5. Budapest XX. aŭ al: Tramista Esperantistaro, Budapest VII, Akácfa u.15.

Deziras korespondi kun fervojistoj: IGNAT NIKOLOV IVANOV Ul. Najĉo Canov N°82 b - SOFIO (Bulgarujo).

# 9-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO KONGRESO

Rijeka - 11-an/18-an de Majo 1957-an

## RAPORTO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini, 4 - Bologna
Sekretario: Via Donato Creti, 61 - Bologna

### 1) - Ĝenerala superrigardo

La A.I.F.E. (Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti) nun I.F.E.A.(Itala Fervojista Esperanto-Asocio) estis refondita en Milano la 17-an de septembro 1950-an por kunigi ĉiujn Fervojistojn Esperantistojn de Italujo, de ĉiaj kvalifiko kaj rango.

La Asocio konsistas el grupoj kaj el izolaj membroj.

La I.F.E.A. nun havas la centran sidejon en Bologna ĉe la "Dopolavor Ferroviario" (postlaboreja fervojista klubo) Piazza Calderini n°4, kaj la sekretariejo en Bologna Via Donato Creti n°61.

La I.F.E.A. proponas al si la jenajn celojn:

a) reprezenti la Italan Esperantan Fervojan Movadon ĉe la Fervojaj Autoritatoj kaj ĉe la Monda Esperantista Fervoja Movado,
b) vigligi en itala fervoja kampo la esperantan propagandon pere de prelegoj kaj esperantaj kursoj,
c) publikigi, monate, la bultenon pri informoj kaj propagando, kaj kunlabori pri la traduko en esperantan lingvon de fervojaj turismaj gvidiloj,
d) organizi, en kunlaboro kun aliaj organizoj, manifestaciojn en Italujo kaj eksterlande por faciligi la reciprokan konon kaj gastamon inter la kolegoj en diversaj landoj.

La Itala Fervojista Esperanto-Asocio estas kultura asocio kaj konservas sin tute for de politikaj, religiaj kaj socialaj ideologioj.

La I.F.E.A. aliĝis al la F.E.I. (Federazione Esperantista Italiana)kaj al U.E.A. (Universala Esperanto-Asocio) kiel aliĝinta membro, kaj al la I.F.E.F. (Internacia Federacio Esperantistoj-Fervojistoj) kiel Landa Rondo.

### 2) - Aktivaĵoj de la Asocio kaj de la anoj

La I.F.E.A. en 1954 organizis la 6-an Internacian Fervojistan Esperanto-Kongreson en Verona 3-an/8-an de majo 1954-an, sub la Honora Prezidanteco de la Jama Ministro de la Transportoj Lia Ekcelenco Hon.Mattarella. Ĉe tiu kongreso partoprenis 621 anoj. Oni atingis do unu el la plej multnombraj ciferoj de partoprenantoj al niaj kongresoj. Tiu sukceso dependis krom de la bela geografia situo de la urbo Verona, ankaŭ de la senlaca propagando kaj senĉesa laboro de la anoj de nia grupo en Verona.

Nia Prezidanto Kav. Zacconi kaj nia sekretario, p.i. Gimelli estis respektive Prezidanto kaj ano de la Loka Kongresa Komitato de la 40-a Universala Esperanto Kongreso okazinta en Bologna de la 31/a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1955-an. Tiu kongreso estis Jubileo de la 1-a Universala Kongreso de Boulogne sur Mere (Francujo).

Nia Prezidanto Kav. Zacconi kaj nia ano D-ro Inĝ.Nanni estas respektive Vic-delegito kaj Delegito de U.E.A. en Bologna; nia ano Rag. Filippi estis Vic-delegito de U.E.A. en Romo kaj reprezentanto de Universala Ligo por Italujo; nia ano Kav. Ramolfo estas Delegito de U.E.A. en Torino kaj D-ro Borione estas Sekretarjo de Itala Esperanto-Federacio kaj Vic-delegito de U.E.A. en Torino; nia ano Franzina estas Fak-delegito de U.E.A. en Vicenza.

### 3) - Aktivaĵoj kaj manifestacioj dum la jaro 1956

En la lasta jaro 1956 la I.F.E.A. partoprenis al jenaj manifestacioj kaj disvolvis la sekvantajn aktivaĵojn:

a) partoprenis sufiĉe multnombre (precipe rilate al la distanco) al la 8-a I.F.E.A.-Kongreso en Stockholmo dum la monato de majo 1956-an,
b) organizis, en la kadro de la 27-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto, okazinta de la 1-an ĝis la 5-an de septembro 1956-an en Massa, la VI-an Nacian kunvenon de sia Asocio,kiu okazis la 2-an de septembro 1956-an,

c) partoprenis multombro, kaj estis la plej multnombra eksterlanda grupo, al la Internacia Fervoja Esperanta Feriosemajno en Vieno (Aŭstrujo) dum septembro 1956, kaj ĝia Prezidanto Kav. Zacconi ofte parolis por prezenti al la diversaj aŭtoritatoj la salutojn de la frendoloj. En okazo de tiu Feriosemajno, la "Dopolavoro Ferroviario" (postlaboreja fervoja klubo) de Bologna organizis karavan-vojaĝon ankaŭ por neesperantistoj por pruvi la taŭgecon de la internacia lingvo en la fervojaj internaciaj rilatoj; tiu ĉi karavan-vojaĝo estis reklamita pere de granda manifesto eldonita en tiu okazo. La partoprenintoj, precipe la neesperantistoj, estis tre mirigitaj pri la kunveno kaj pri la bonega organizo de la tuta aranĝo.

d) sendis medicinojn la du bulgaraj fervojaj esperantaj kamaradoj malsanoj de T.B.S. Tiuj kolegoj nomas: H.M. Kasinov Sveŝtari-Isperihsko kaj D. Ĉardaklief Sveŝtari-Isperihsko. Tiu ĉi medinoj estis donacoj de italaj esperantistoj,

e) organizas, kiel kutime, ĉe la profezia lernejo de la Fervoja Administracio en la centra stacidomo de Bologna, en kunlaboro kun la "Dopolavoro Ferroviario", esperantan kurson. Tiu kurso ekkomencis la 20-an de novembro 1956-an kaj daŭros proksimume ĝis la monato de junio 1957. La "Dopolavoro Ferroviario" presis grandformatan kaj verdkoloran manifeston por reklami la esperantan kurson inter la fervojistoj. ankaŭ en aliaj urboj estas organizitaj esperantaj kursoj por fervojistoj por disvastigi la Internacian Lingvon inter la fervojistoj, ekzemple: Verona, Milano, Torino, Cagliari, Cosenza, Padova, k.t.p.

f) eldonis regule la "Informa Bulteno"-n kaj aliajn normalajn aktivaĵojn.

g) Nia konsilanto Corso kai nia ano Belloni partoprenis, sekve de invito de la Franca Fervojista Esperanto-Asocio, al la jara ĝenerala kunveno de la F.F.E.A. okazinta en Parizo la 9-an de decembro 1956-an,

h) Nia estraro sendis nome de nia Asocio bondezirojn al la Ĝenerala Direktoro de la Ŝtata Fervoja Administracio kaj al la Estro de la Centra Oficejo de "Dopolavoro Ferroviario" okaze de liaj elektoj al gravaj respondecoj. Sekve de tio ni ricevis el ili bonajn kaj kuraĝigajn vortojn pri nia movado.
Dum la lasta jaro la anaro de Itala Fervojista Esperanto-Asocio konsistis el 67 anoj, sed nun tiu nombro kreskas.

Jen, konciza bildo, de la Fervojista Esperanto-Movado en Italujo.

Bologna, la 4-an de majo 1957-an

LA SEKRETARIO DE I.F.E.A.
(Gimelli p.i. Germano)